

**FLANDRA  
ESPERANTISTO**



**MONATAJ REVU O**  
**ORGANO DE LA FLANDRA**  
**ESPERANTO**  
**MOVADO**

Oficiala Organo  
de \_\_\_\_\_

Flandra \_\_\_\_\_  
Ligo \_\_\_\_\_  
Esperantista \_\_\_\_\_



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereniging zonder Winstbejag  
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK  
Poŝtĉekonto: F. E. I. 3268.51

## EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	Fr. 32,—	bind.
Per balono al la poluso — Andrée	70,—	»
Leono de Flandrujo — Conscience	55,—	»
Pallietier — Timmermans	43,—	»
Pallietier — Timmermans	33,—	broŝ.
La Esperanto-Kiubo — Malmgren	6,50	»
Hurah! — Baghy	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	»
Amo kaj Poezio — van Schoor	10,—	»
La du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Infanoj de Betlehem — S. Lagerlöf	5,—	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf	12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gosta Berling — Selma Lagerlöf	39,—	»
La Sorĉistino el Kastilio — S. Asch	24,—	»
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy	14,—	»
Dialogoj en Esperanto — E. Dahl	3,75	»
Dialogoj kaj Komedietoj — E. Dahl	3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	3,50	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz	17,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz	17,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)	12,—	»
Plena Vortaro de Esperanto	75,—	»
Tra la Labirinto de la E. gramatiko (volmakingskursus)	36,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,—	»
Leerboek Dirksen, 2 deelen	12,50	»
Konversacia Literaturo (illustr. broŝuroj)	10,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witteryck	5,—	»
Literatura Mondo (monata revuo) Jarabono	62,50	»
Groot Woordenboek Van Straaten	70,—	»
Schidlof Zakwoordenboek	22,50	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)	15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n <sup>o</sup> 1)	10,—	»
Flageto por biciklo	6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	1,50	»

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 1,75 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,25 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 3,50 fr.

**Glumarkoj**, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kosta po 5,— fr. por 10 folioj.

**Glumarkoj** « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.


Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

**La prezoj ne entenas afrankon.**

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate

Redaktoro :  
(tempe funkcianta)  
A. Lodema  
Houwerstraat, 22  
Antwerpen.  
Tel. : 277.51.



Administranto :  
Gerard Debrouwere  
Magdalenastr. 29  
Kortrijk

Jara abonprezo : 20 frankoj. — Eksterlando : 5 belgoj  
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.  
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

## JULIUS KARNAS †

Nia Redaktoro mortis... Juul Karnas ne plu estas...  
La terura, ĝis nun nevenkebla malsano, la pulma  
tuberkulozo, falĉis ĉi tiun junan kaj multpromesan vi-  
von for el nia mezo...

Li mortis en Lausanne, Svisujo, la 20an de februaro  
je la 17.30a horo.

Nur antaŭ duonjaro, la 24an de aŭgusto, dum la  
Ligkunveno en Brussel, li akceptis la taskon de Redak-  
toro. En novembro, li iris por la dua fojo Svisujon, an-  
taŭe redaktinte ĉefartikolojn por decembro kaj januaro.

Baldaŭ oni devis, denove, operacii lin. Dum  
Kristnasko ni ricevis malgrandan leteron de li... fland-  
ralingve... Antaŭsigno nemiskomprenebla...

En sekvonta numero ni presigos priskribon de lia  
Esperantista vivo.

Al lia edzino, al lia fileto Hendrik, al lia patro kaj  
gefratoj, ni elkore esprimas niajn sincerajn kondolen-  
cojn, esperante ke ili trovu la necesan forton por porti  
tian teruran sortobaton.

FLANDRA ESPERANTISTO.  
FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.

# Flandra Ligo Esperantista

NOTU BONE !

Cion, kio koncernas la Redakcion de Flandra Esperantisto, oni sendu al S.ro A. Lodema, Houwerstraat, 22, Antwerpen, kiu provizore funkcias kiel Redaktoro, ĝis kiam la estraro de F. L. E. decidis pri nova gvidanto de nia organo.

\* \* \*

La membroj estas invitataj al la ligo kunveno, kiu okazos dimanĉon 24-an de marto, en la ejo BREUGHEL, Emiel Jacqumainlaan, 37, Brussel.


*Tagordo:*

- 9-a h. Estrarkunveno.
- 10-a h. Generala kunveno :
  1. — Raporto de la Sekretario.
  2. — Situacio de la Ligo.
  3. — Brusela kongreso.
- 14-a h. Daŭrigo.
  4. — Diversaĵoj.

La Sekretario.

---

MONDEKSPOZICIO, BRUSSEL 1935.



NEDERLANDA PAVILONO

arkitekto: Roosenburg.

## Komunikoj de la Brusela Kongreskomitato



Kun plezuro ni sciigas, ke la akiritaj rabatoj sur la enlandaj fervojoj kaj sur la ŝipoj Oostende-Dover, restos validaj dum 10 tagoj; nome de la 7-a de junio ĝis la 17-a. La kongresanoj, kiuj deziras plilongigi sian restadon en Brusel, povos do tion fari, ĉiam ĝuante la favorkondiĉojn por la reveturo.

La organizantoj de karavanoj: J. Telling, ĉefd. U. E. A. Nederlando (el Rotterdam kaj Roosendaal) kaj F. Wadham, ĉefd. U. E. A. Londono (el Londono) efike propagandas nian kongreson en eksterlando kaj, laŭ ĝojigaj antaŭsignoj, ni povas esperi ke nia 6-a logos ankoraŭ pli da eksterlandaj sa-

midianoj ol nia Jubilea pasintjare en Oostende, kiu tamen fieras, kaj rajte, pri la grandnombra eksterlanda partoprenantaro.

La organiza komitato senlace laboras al preparo de la kongresprogramo, kiun ĝi nepre deziras tiom alloga kiom varia kaj interesa. La provizoran programon ni publikigos en la sekvonta numero de F. E., kiu cetere estos speciale dediĉata al Brusel.

La vesperaj festoj okazos en belegaj salonoj; por plene sukcesi ilin ni jam dungis faman dancorkestron, la dancemuloj do ĝoju. Sed ne nur por amuzado ni zorgos; ankaŭ interesaj arangoj ne mankos sur la programo. Dum la dimanĉa festo estos ankaŭ organizata granda kongrestombolo kies premioj konsistos el valoraj objektoj kaj precipe el belaj libroj. Tiu tombolo estos vera bonŝanco por la libroamikoj.

Lundo, la lasta kongrestago, estos speciale kaj grandparte dediĉata al vizito de la Mondekspozicio. Unuvorte, nia 6-a prezentos laŭ ĉiuj vidpunktoj tiom da allogaĵoj ke ĝi nepre devas superi la antaŭajn kongresojn rilate la nombro de partoprenantoj.

Tamen, por plene atingi tiun celon, necesas ke en ĉiu grupo la estraranoj persiste propagandas kaj senlace instigas al partopreno.

Ni denove insistas: ne prokrastu vian aliĝon ĝis la apero de la aliĝiloj! Ankaŭ la grupoj, kiuj organizis ŝparkasojn, pagu la aliĝojn de la ŝparantoj tuj kiam la enkaso tion permesas, ili efike helpos al ni. Okaze de grupaj aliĝoj oni aldonu la nomojn kaj precizajn adresojn de ĉiuj aliĝantoj. Ankaŭ individuaj aliĝantoj ne forgesu komuniki al ni siajn adresojn, kiel jam okazis.

Malgraŭ admono en antaŭa komuniko, estas ankoraŭ kelkaj grupoj, kiuj ĝis nun ne pagis la ricevitaĵajn kongresmarkojn. Ili bone konsciu ke, en similaj okazoj, estas la grupoj kiuj devas montri ekzemplan akuratecon. Ni petas do la koncernajn estraranojn plej baldaŭ senŝuldigi siajn grupojn.

Ni petas la grupojn, kiuj posedas fasadflagojn aŭ aliajn aĵojn dumkongrese uzeblaj, havigi ilin al ni, aŭ pli bone, alporti ilin al la venonta ligkunveno kiu okazos la 24-an de marto en la liga sidejo « Breughel ».


Ni ripetas: la organizoj, kiuj deziras dumkongrese aranĝi fak-  
kunsidon, plej baldaŭ rilatu kun L. K. K. aŭ tutlaste petas tion dum  
la ligkunveno.

De la kongresaj propagandmarkoj restas al ni nur malgranda  
kvanto. La intersemuloj do rapidu! (Ili kostas po 7 fr. por cent,  
mendojn ni nur plenumas post antaŭpago).

Kongreskotizo : 10 fr.; post Pasko : 12 fr.; por eksterlandanoj :  
2 B., 2 1/2 B. post Pasko. La kongresa ĝirokonto sub n-o 41 36 04  
funkcias je nomo de E. Cortvriendt, sekr. de la organiza komitato.  
Adreso de la kongresoficejo : 3, P. van Humbeekstr. Brussel-West.

---

### MONDEKSPOZICIO, BRUSSEL 1935.



#### MALNOVA BRUSELO

arkitektoj: Delange kaj Blockx.

---

## Averto

Diversaj Esp. gazetoj daŭre ricevas plendojn kontraŭ la eldo-  
nejo « Populara Esp. Biblioteko » en Amsterdam.

Tiu instituto jam faris kelkajn viktimojn, inter kiuj ankaŭ  
U. E. A. Ni avertas niajn membrojn ke « P. E. B. », de kiu « Belga  
Esperanto Instituto » posedas la solvendrajton por Belgujo, estas  
nefidinda.

# Leteroj el Esperantujo

V.

AMIKO LA KOKO,

Sendube vi memoras ke mi iam skribis pri Zamenhofstratoj kaj monumentoj. Nu, « Svenska Esperanto Tidningen » kalkulis ke sume 56 Zamenhof- kaj Esperantostratoj kaj placoj troviĝas en diversaj landoj. Mi ne volas konsideri nun, ĉu tiu nombro estas granda aŭ malgranda, rilate al la aĝo kaj disvastiĝo de nia lingvo.

Mia optimismo diras min, ke la nombro iom post iom pligrandiĝos, kaj ke ĝi duobliĝos en malpli da jaroj ol ĝi bezonis por atingi la nunan ĉifron. Tamen... unu Zamenhofstrato malaperos!

Jen parto el la raporto de kunveno de la loka grupo de G. E. A. en Dresden.

« Post malfermo la grupestro petis la kunvenintojn, leviĝi je honoro de D.ro Zamenhof, kaj komunikis, ke dum antaŭtaga kunveno de la urba deputitaro estis farita kaj akceptita la propono ŝanĝi diversajn stratinomojn en Dresden, inter aliaj ankaŭ la Zamenhofstrato ».

Cio, kio en Germanujo estas ne-arja, aŭ devenas, aŭ nur memorigas al ne-arjoj estas kondamnita je malperero. Kiam malaperos la 2 ceteraj Zamenhofstratoj, kiuj ankoraŭ restas en Germanujo? Aŭ, ĉu ili ankaŭ jam ne plu ekzistas? Sed... ĉu la Dresdenaj Esp. ne klopodis malhelpi tion? vi eble demandas! Ho, ne amiko! Tia klopodo estus danĝera por niaj Dresdenaj samideanoj, ĉar la urbeŝtraro suspektus ilin je rilatoj kun ne-arjanoj kaj tio estas en la nuna Germanujo plej granda peko. La grupestro, prave, proponis al la membroj ne komenti tiun informon. Mi prefere estas Esperantisto en Flandrujo ol en Germanujo !!!

Pli bone sin sentas sendube la Esperantistaro loĝanta sur la nederlanda insulo TEKSEL. Tie ekzistas kelkaj diverstendencaj Esperantogrupoj, kiuj tamen formas unu federacion. El la 7.900 enloĝantoj 200 estas Esperantistoj! Kaj krom tio Teksel ankaŭ posedas sian Zamenhofmonumenton. Ho, se ni povus nombri 200 Esperantistojn el ĉiu 8.000 loĝantoj de nia terĝlobo! Tiam... tiam mi ne plu bezonus skribi leterojn el Esperantujo !

En la januara numero de « Franca Esperantisto » S.ro P. Petit, konstanta sekretario de Societo Franca por la Propagando de Esperanto (S. F. P. E.) kaj komitatano de U. E. A., verkis artikolon pri organizo de landa asocio. En tiu artikolo li priskribas la internan organizon de S. F. P. E.

Sed la lastaj du alineoj altiris mian atenton. Jen legu :

« Kompreneble, la naciaj cirkonstancoj ne permesas saman organizon en ĉiuj landoj. Sed ŝajnas al ni, ke la movado estas des pli forta, ke la landa asocio havas komunan kaj unuigitan agadon.

» Eble, en kelkaj landoj, malfacile estas kunigi ĉiujn esperantistojn de la neŭtrala movado en unu sola landa asocio. En tia okazo, la gvidantoj de UEA devas zorgi, ke ĉiuj esperantistoj de tiuj landoj povu, kun samaj rajtoj, kunigi en UEA. Ni serĉos, la proksiman monaton, kian solvon, akcepteblan por ĉiuj ni povus proponi por tiu delikata problemo. »

Leginte tion mi prenis mian fontanplumon kaj al S.ro Petit mi skribis ke mi senpacience atendas la sekvontan numeron de « Franca Esp. » kaj ke mi esperas ke li en tiu artikolo montros la pardonon tra kiu Fl. L. Esp. povas eniri U. E. A. 'on. Kaj ankaŭ mi demandis al li la kialojn, kial la Kataluna Asocio en Hispanujo kaj la Germana Asocio en Ĉekoslovakujo estas konsiderataj kiel landaj asocioj de U. E. A. kaj Fl. L. Esp. ne.

Ci tiun leteron mi estis forsendonta, kiam mi ricevis la februaran numeron de « Franca Esperantisto », de S.ro P. Petit rekte al mi senditan.

La konkludo de S.ro P. estas ke U. E. A. devas akcepti duan aŭ eĉ trian landan asocion el sama regno. Kaj li aldonas la ŝanĉojn, kiuj estas necesaj en artikoloj 12 kaj 37 de la statutoj de U. E. A. por ebligi tion.

Mi poste ankoraŭ skribas al vi pri tio.

Amike salutante,

via

R. LA VULPO.

## Konkurso

Karaj gelegantoj,

La enketo en la decembra numero de Fl. Esp. estis bona ideo de la redakcio. Sendube multaj respondoj alvenis ĉe amiko Rik Van Durme, tion pruvas la longa artikolo, titolita « Nia Enketo », kiu aperis en la februara numero. El tio estas konkludebla ke la legantaro multe interesiĝas pri la artikoloj kiuj regule aperas en nia revuo.

Parolante pri la revuo mem, mi legis en la supremenciita artikolo ke oni devus pliampleksigi ĝin. Laŭ mi tio ne necesas, se oni nur plenumas la diversajn dezirojn de la gelegantoj.

Inter la ensendintoj estis certege tre bonaj esperantistoj, eĉ multaj, pli bonaj ol mi mem, kaj, se vi legis la lastan paragrafon de « Nia Enketo », vi certe ekvidis ke iu inter viaj amikoj proponis konkurson. Oni do petis min, detale ellabori mian projekton, kaj, ĉar mi proponis ion, mi ankaŭ volas realigi ĝin..

Ke certaj personoj ekridus legante « eminenta deziranto » tio estas nepridubebla, eĉ mi mem faris al mi la rimarkon : « Ĉu vere mi estas tia eminenta persono? » Kaj mi estas devigata respondi : « Tute ne ». Mi estas, kiel oni titolas tion en flandra lingvo : « Kleinne garnaal », aŭ esperante : « Malgranda salikoko », sed tio nenion signifas. Mi ellaboris mian projekton.

La ideo venis tiel subite en mia malgranda kaj mallarĝa spirito, ke mi eĉ neniam antaŭe estis pripensanta ĝin kaj respondante la lastan demandon : Kion vi dezirus en F. E., la bela ideo de konkurso estis skribita de mia plumo eĉ ne havante skizon pri tio.

Eble pro tio oni titolas min « eminenta deziranto »? Kaj se mi vere estas eminentulo, mi ege bedaŭras ke vi neniam antaŭe legis ion originalan de mia mano. Mi ne estas naskiĝinta verkisto kiel Streuvels, Buysse, Timmermans kaj aliaj.

Sed ĉesu mi nun pri la rimarkfarado kaj transiru al la konkurso-afero. La konkurso kiun mi do proponas, estas parte je la profito de la kazo de Flandra Esperantisto. Jen la projekto :

Konkurso inter la abonantoj, kiu konsistos el redaktado en esperanto-lingvo de iu temo.



La temo estu sufiĉe facila por ebligi ĉiun partopreni, kaj la subjekto de la redaktota artikolo estos donata de la komitato.

La diversaj subjektoj aŭ temoj estos :

1. — temoj pri esperanto ĝenerale.
2. — temoj pri la movado en la lando.
3. — temoj pri la starigo de esperantaj grupoj.
4. — temoj pri la organizo de lokaj grupoj.
5. — temoj pri la propagando por Esperanto.
6. — ordinaraĵ redaktaĵoj.
7. — disertacioj.

La pritraktotaj temoj ne povas enhavi politikajn ideojn, ĉar la neŭtrala Esperanto-movado ne toleras politikajn tendencojn.

Al la partoprenontoj estas donataj tri monatoj por ilia verko.

Estas permesate al ĉiu partoprenonto ensendi plurajn artikolojn sed ĉiu artikolo devas esti akompanata de sumo de Fr. 5,—

Ne estas permesate ke partoprenanto pritraktu dufoje la saman temon laŭ du diversaj vidpunktoj.

Estas do klare ke la partoprenantoj priparolu ĉiajn temojn, sed ne la saman dufoje.

Komitato por la korektado estos formata el la sekvontaj personoj: Sinjoro L. Calloens, Prezidanto.

Sinjoroj Debrouwere, Rainson, Lenaers, komitatanoj.

Tiu komitato havas du monatojn por prijuĝi la ensenditajn verkojn kaj ili premios la plej bonan verkon per esperanta libro el serio, kiun ni esperos konatigi al la legantaro antaŭ la malfermo de la konkurso.

La libro, kiu estos donata kiel premio, havos la minimuman valoron de *Fr. 10*, ; tiamaniere vi certe ricevos rekompencan laŭ laboro.

La premiita artikolo aperos en la julia kaj januara numeroj de F. E. Mi proponas komenci tiun-ĉi jaron per unu konkurso, por ebligi al ĉiu partopreni al ĝi. Se la konkurso havas sufiĉe grandan sukceson, ni daŭrigos per tri aŭ eble kvar konkursoj ĉiujare, tio dependas de la bonvolemo de la gelegantoj.

Mi ankoraŭ forgesis gravan punkton : Al la komitatanoj ne estas permesate partopreni la konkurson. La kotizo de fr. 5,— estos pagata al Sinjoro Debrouwere, Magdalenestraat, 29, Kortrijk, kun la komunikaĵo « Konkurso ».

Jen do la ellaborita propono.

Mi esperas ke ĉiuj niaj anoj komprenos kaj ŝatos ĝin kaj ke ili plenfervore partoprenos la konkurson.

Ĝi havas, kaj mi mem jam multfoje spertis tion, multajn profitojn. Ni komencu la konkurson per redaktado de artikolo pri Esperanto ĝenerale.

Pensu Esperante :

Skribu Esperanton :

Gajnu la premion :

Tiuj estas miaj konsiloj al vi ĉiuj, miaj karaj gelegantoj, kaj mi esperas ke vi multnombre partoprenos

Kun samideanaj salutoj.  
Daniël Mortelmans,  
Edegem.

Ni esperas ke la Sinjoroj kiuj tiel neatendite estas « bombarditaj » juĝantaron de S.ro M. ne rifuzos sian oficon. Pli bone estus se la komitato konsistu el 5 aŭ 3 personoj anstataŭ 4. Kiel redakcio ni ordonas ke la artikoloj ne povas okupi pli ol du paĝojn de Fl. Esp. La artikoloj de la unua konkurso devas esti ensenditaj antaŭ la 25a de majo ĉe S.ro Debrouwere kaj la premiita artikolo antaŭ la 15a de junio ĉe ni.

LA REDAKCIO.

## Skisaltkonkurso en Svisujo

*(Ĉi tiun artikolon S.ro J. Karnas verkis dum sia unua restado en Svisujo, kiel leteron al sia edzino. Estante ne kapabla por verki ĉefartikolon por la nuna numero, li komisiis al ŝi ensendi ĝin).*

Granda homamaso jen jam atendas ĉi tie, malsupre, la komencon de la spektaklo. Radiofono pliagrabilis la atmosferon kaj malstreĉigas la nervojn, per gajaj dancmelodioj. Intertempe, laŭlonge de la longa kaj je la malsupre plilarĝiganta glitejo el iom frostiginta neĝo, la vetkurontoj penige grimpas al la montosupro kun iliaj longaj skioj. Baldaŭ ili ŝajnas esti nur ankoraŭ malgrandaj koboldoj, pri kiuj oni ofte al infanoj rakontas. Ili pretigas sin, metas siajn skiojn kaj ekkomencas genuflekse salteti por provi kaj bone konservi sian flekeblecon. Ni profitu de tiu intertempo por iom pliatente rigardadi la glitejon mem. Komencante preskaŭ je la supro de la montopiko, ĝi estas kvazaŭ blanka sulko, fosita inter la abioj, Ĝi havas fortan deklinton, kiu pli malfortigas je la malsupro, por poste iĝi tute ebena kaj fini en malforta, kontraŭa deklino, kiu funkcias kiel haltigilo.

Proksimume meze de la deklino, trajbajaro disigas la glitejon en du partoj, el kiuj la supra ebligas sufiĉe rapidan glitadon antaŭ la salto, dum sur la malsupra parto la konkuranto daŭrigos la interrompatan glitadon. La salton mem oni efektivigas de la trajbajaro, kiu estas alta je proksimume 2,5 m.

La tuta areno estas brile glata, kaj komence de la trajbajaro oni starigis laŭlonge de la glitvojo sur granda parto de la deklivo, aron da flagetoj, kiuj permesos mezuri la longecon de ĉiu salto.

Laŭtparolilo anoncas la komencon de la spektaklo. Eksaltos S.ro X., el Montana. Silento tuj ekregas kaj ĉies atento estas streĉita. Iu forigas ruĝan flageton, kiu ĝis tiam staris meze sur la saltotrabajaro, kaj tiel anoncas al la saltonto ke la glitejo estas tute libera kaj ke la publiko atendas. La silento ĉesas kaj mallaŭta murmuro aŭdigas inter la ĉeestantoj. Tie, tute supre io ekmoviĝas, malsuprenglitas dolĉe kaj ĉiam pli rapidiĝante. En regula takto genufleksante, svingante malforte la brakojn kaj la korpon, S.ro X., alproksimiĝas la trajbajaron, eksaltegas, flugas, ŝvebas dum kelkaj momentoj tra la aero, revenas ŝanceliĝe sur la glitejon, ekkaptas la ekvilibron kaj rapidege malsuprenglitas, preterpasante al mi kiel fulmo kaj fine haltige surveturas la finan deklinton. Tondrelaŭta aplaŭdo eksalutas

la heroon, kiu jam ree estas en la areno kaj penplene ekkomencas denove suprengrimpi por pretigi sin al dua salto. Intertempe oni reebenigas la glitejon, kiun la skioj iomete difektis kaj la laŭtparolilo anoncas: « S.ro X., el Montana efektivigis saltan de 37 m. » Mute mi admiris la tutan spektaklon kaj konvinkigis pri ĝia danĝero. Sed oni ne lasas longan tempon al pensado, ĉar jam oni anoncas la sekvontan saltan. La flageto denove malaperas, nova murmuro, nova salto, kiu nur diferencas de la unua per tio, ke la ŝanceliganta efektiviganto perdas la ekvilibron, falas kaj kapriolante malsuprenrulas, sekvate de la skioj, kiuj aŭtomate foriĝis de la piedoj. Apenaŭ oni havas la tempon remetigi de la kaŭzita emocio, ĉar jam la saltinto ekstaris, kunigis siajn aĵojn kaj montogrimpante ekprettigas sin, kiel la unua, al dua salto. Oni rebonigas la glitejon kaj la radioaparato anoncas ke ni vidis salteton de 39 m. Tria saltonto estas anoncata, jene: S.ro. Henri Duchet el Villars ĉiunvenkinta skisaltanto el la mondo. Komprenoble oni pli atendas de li, pro la honora titolo. Kaj vere, estos io eksterordinara, ĉar je preskaŭ ne videbla alteco li ekkomencas la alglitadon. Duchet saltas majeste bele, ŝvebas, flugas kaj glitas kapturnige rapide de la deklivo. Li samrapide prefervenas al mi, dum intertempe surdiga aplaŭdo ektondras el la densa homamaso. La laŭtparolilo jam sciigis al ni ke S.ro. Duchet notas salteton de 59 m. je sia aktivo. Specialaj gratuloj sekvas la anoncadon, dume al la glitejo oni faras ĝian tualeton. Tiel la saltetoj sin sekvas, bone sukcesintaj aŭ finintaj per serion da piruetoj, dum kiuj oni sincere interesigas pri la stato de la realiginto. Fine tamen ĉiu saltinto bonfarte staras sur la du piedoj kaj por fini la spektaklon oni anoncas duoblan salteton, farotan de la du plej lertaj konkursantoj. Ĉies nervoj plej atente estas streĉataj. Kio okazos? En la plej altaj suproj jam prete staras la vetkurontoj. La flageto malaperas de la trabajaro kaj man' en mano ambaŭ homoj eklitas en sama rapideco, en sama balancado. Tuj antaŭ la salteto la manoj disiĝas, du korpoj kurbigas samtakte kaj hup!... flugante unu apud la alia ili levigas en la aero, ŝvebas malsupren, ektuŝas la teron por malsuprenigli; sed dum la unua falas rulante kaj piruetante de la deklivo, la alia sukcesas gardi la ekvilibron kaj plenumi mirinde belan malsuprengliton. Nova aplaŭdo apenaŭ ekbruegas kiam la sukcesinto jam ree estas en la areno kaj alvenas ankoraŭ sufiĉe frue por helpi ekstarigi sian malpli lertan aŭ malpli felicān kamaradon. La duobla salto estis longa je 53 m.

Per tio, la konkurso finis kaj la ĉeestantoj kiel nigra rubando sur la blanka neĝfono, malsupreniras al la hejmo aŭ al novaj spektakloj.

JUUL KARNAS.

## **Mankantaj Numeroj**

Kelkaj abonantoj demandis la 1an numeron de la 6a jarkolekto de F. E. La numero estas elĉerpita. Eble Fl. Esp. Inst. ankoraŭ disponas pri kelkaj.

LA EKSPEDISTO.

## Komunikoj

*Ekzamenoj.* — Okazos ekzamenoj pri simpla kaj supera kapableco, la 28an de aprilo en Brugge. Horo kaj loko sciigotaj en la aprila bulteno.

Partoprenos samideanoj el Oostende kaj ankaŭ aliaj estas atendataj.

Partoprenontoj sendu 10 fr. al Poŝtekkonto de F. E. I. 3268.51.

## Het Bedevaartkomiteit werkt

### WIE ZOU HET NIET WILLEN STEUNEN ?

De jongste algemeene vergadering van het Comiteit der Vlaamsche « Bedevaart naar de Graven aan den IJzer » heeft plaats gehad te Gent en was zeer belangrijk! Vooral de finantieele toestand van dit groote Vlaamsche werk maakte het onderwerp uit van een ernstige en diepgaande bespreking, waaruit bleek dat de toestand zeer moeilijk is. Met den daadwerkelijken steun van alle goedgezinde Vlamingen hoopt het Comiteit echter de zware tijden te boven te komen. De door het Comiteit uitgegeven kasbons, 4 percent nettó interest gevend, worden overal begeerd. Op dit gebied is een krachtige medewerking van alle comiteitsleden en vrienden van de Bedevaart ten zeerste gewenscht. Men vragé hierover inlichtingen en inteekenbiljetten op het Sekretariaat, Wilfordkaai, 16, Temsche.

Een ander belangrijk besluit betreft de overbrenging op einde Februari a. s. van het bestendig sekretariaat van de Bedevaart naar Diksmuide, waar dit sekretariaat tevens geheel wordt heringericht. Voortaan zal het, mits voorafgaande schriftelijke mededeeling, mogelijk zijn, in den Winter, den Vlaamschen Doodentoren in groep te bezoeken. In den schoot van het Comiteit zijn verscheidene commissies tot stand gekomen, die ieder haar werkkring hebben afgebakend en een aantal technische vraagstukken, de Bedevaart en het Bedevaartwerk betreffend, in behandeling hebben genomen. Het Bedevaartcomiteit werkt! Laat het door uw daadwerkelijken, finantieelen steun, ook van uwe medewerking een blijk ontvangen !

### DE IJZER- EN BEDEVAARTFILMEN.

Geen hoekje in Vlaanderen of onze prachtige filmen « Met ons Jongens aan den IJzer » (6 deelen) en de « IJzerbedevaarten » (6 deelen) komen er de Vlaamsche gedachte, de zucht naar Wereldvrede en den geweldigen groei der Bedevaarten op het witte doek verkondigen. Geen beter, zoo onmiddelijk inslaande propaganda voor de bedevaartgedachte, dan de film die zoo luide spreekt tot het hart en gemoed van den toeschouwer, dat deze in zich zelf onweersaanbaar dan drang voelt opkomen om de volgende maal ook daar bij te zijn !

Voor speciale muziekaanpassing kan gezorgd worden. Waar reeds een filmavond gegeven werd, kan men een gansch nieuw programma bezorgen waarbij de laatste XV<sup>e</sup> IJzerbedevaart, enz... Vraagt inlichtingen op het Sekretariaat, Wilfordkaai, 16, Temsche, (bijzondere krisis-voorwaarden).

## Kial ?

Sur propagandfolio por Germana Esperanto-Ligo en Ĉekoslovakujo, ni legas :

« G. E. L. ampleksas la germanlingvajn esperantistojn en Ĉekoslovakujo. Membroj povas esti germanlingvaj personoj, aĝaj pli ol 16 jaroj. La membroj kuniĝu 1) en branĉsocietoj laŭ religio, 2) lingvo, raso, profesio k. t. p., 3) sen rilato al tiuj fakoj nur loke » en distrikt-ligoj kaj en tiuj en grupoj por la koncerna loko kaj ties ĉirkaŭaĵo. »

Ni fiksas la atenton de la legantoj sur la fakto ke antaŭ nelonge B. L. E. argumentis en sia bulteno ke F. L. E. ne estas neŭtrala ĉar ĝi akceptas religiemajn kaj naciemajn grupojn, kaj tiel rifuzas al ĝi la rajton aliĝi al U. E. A.

G. E. L. kaj F. L. E. laboras laŭ samspeca bazo.

G. E. L. estas ekceptita de U. E. A. kiel nacia societo.

F. L. E. ne estas akceptita.

Kial ?

D.

## Tre Grave por Esperantaj Verkintoj

Por kompilado de grava bibliografia verko, la flandra literaturisto Prosper Arents ŝatus scii kiaj Esperantaj tradukoj de flandraj poezi- aŭ prozaĵoj aperis en la diversaj Esperantaj revuoj. La interesuloj sciigu al li, la Esperantan kaj flandran titolon de la tradukaĵo; la verkon el kiu ĝi estis ĉerpita; la titolon, paĝon, numeron kaj adreson de la revuo en kiu la tradukaĵo aperis. La verko devas esti preta antaŭ la fino de l'jaro; do la afero urĝas. Skribu flandre al S.ro Prosper Arents, Stedelijke Hoofdboekerij, Conscienceplein, Antwerpen.

## Esperanto kaj la Junularo

La Esperanta movado estas unu el tiuj multaj idealistaj movadoj kiuj, ĉar ili volas enkonduki ion novan, ne ĝuas la simpation de la spiritmaljunaj personoj kaj precipe de la diversaj registaroj. Kompreneble ni tamen ĉiam klopodas atingi kaj atentigi la ĉefulojn. De tempo al tempo ni havas sukceson sur tiu tereno; sed nur post kiam tiuj ĉefuloj estas preskaŭ devigataj; kiam evidentege la bono de nia movado staras antaŭ iliaj okuloj. Jam nia Majstro mem, la ideala realisto, tute konsejiĝis pri tio: « La mondo nur kliniĝas pro la forto de plenumitaj faktoj » (9-XI-1906, en letero al S.ro Couturat). Ci-tiu sentenco vere povas esti la ĝenerala regulo en nia batalo. Ni volas forigi la sensencan interpopolan bazon de la diverslingveco; ni volas ke ĉiu tuj povu konatiĝi kun la tuta mondo; ni volas ke ĉiuj homoj-filoj de l'sama patro plej bone interkompreniĝu. Jen nia ilo : Esperanto. Kia grandioza projekto !

« Neefektivigebla » tuj diros la pantofloherooj de malantaŭ sia hejtilo.

« Dangera » antaŭjuĝas la konservema stabiligita burĝo. Kaj al

tiuj plat-al-teraj kotvermoj ni afable prezentas la renovigon de la mondo. Ĉu ni esperu subtenon kaj kunlaboradon de ili? Tute ne. La neordinara ne allogas ilin eĉ se ĝi havas ĉiujn kvalitojn. Ili sukcesis agrablan kompromison kun la ĉi-situacia mondo, do : ne ŝanĝu ĝin ! Kaj la leĝo de la plej malmulta penado ! Tiu una oficiala vojo estas barikadita. Ekzistas ankoraŭ alia vojo : per la popolo. Kaj sur tiu tereno ni vere konas brilajn venkojn. Ne estas necese insisti pri tio. Ĉiu Esperantisto kiu informiĝas konstatas tion. La vojo per la popolo! Sed en tiu popolo estas diversaj kategorioj. Ne ĉiuj havas la samajn eblecojn kaj kapablecojn por labori. Mi ne volas longe babiladi pri io kion ĉiu scias, nome ke la junularo kaj precipe la studenta junularo plej taŭgas en tiuj movadoj. Ili havas la necesan tempon; ili ŝatas ĉion novan; oni povas konvinki ilin por idealo; ili estas la estontaj gvidantoj k. t. p. Nun estas stranga fakto, ke nia movado, kiu konas tiom da simpatio ĉe la popoloj, estas tiel malmulte disvastigita inter la junularo. Ĉu iu kontraŭdiros? Mi ne opinias. Oni ĝenerale konstatas tion. En la universitato de Gent mi nur konas kvin studentojn Esperantistojn. Studento el Nymegen diris al mi, ke li eĉ ne unu Esperantiston konas en la tiea universitato. En niaj kolegioj oni foje renkontas iun, kiu jam iom okupiĝis pri Esperanto. Nur malmultnombraj estas la kelkaj junularaj Esperantogrupoj kaj tio precipe-mi rediras-ĉe la studentoj. Kiel klarigi tion? Certe mi ne konas la situacion en ĉiuj landoj. Ĉu ne estos en ĉiuj landoj Esperantisto kiu staros meze de la junularaj movadoj kaj kiu povus verki artikolon pri tiu problemo? Mi ĉi-tie nur volas doni kelkajn pensojn pri mia lando FLANDRUJO. Mia tasko do estas serĉi kelkajn kialojn pro kiuj Esperanto ne rapide antaŭenmarŝas ĉe niaj junuloj. Kaj la unua kialo kiun mi povus alporti estas: ke Esperanto ne estas sufiĉe prezentata kiel idealista movado.

Certe niaj internaciaj kaj eĉ niaj naciaj revuoj sufiĉe insistas pri nia idealo kaj pri la interna ideo. Sed tio estas por tiuj, kiuj jam depost du aŭ pli jarojn staras en la movado. Sed por la ekstera mondo? La grupoj faras propagandon speciale atentigante pri la utileco de Esperanto. Mi ne povas tute malpravigi ilin; mi ja konsentas ke ĝi estas delikata kaj ne tre facila problemo. Niaj grupoj plej grandparte konsistas el maturaj viroj kaj virinoj. Kiam ili persone aŭ publike propagandas, ili celas atingi homojn ankaŭ ne plu junecajn. Por tiuj lastaj la « idealo » ne plu havas tiun allogon; la tempo de la idealoj estas for; ili havas spertojn; ili scias kiuj rezultatoj efektiviĝos. Nur la utileco kapablas ankoraŭ kapti ilin. Kontraŭe, je tio la junularo staras pli malpli indiferenta.

Nur idealojn ili povas kompreni kaj karesi. Jen staras fendego inter la lokaj Esperantaj grupoj kun siaj afiŝoj, burĝaj rezonadoj kaj la al idealoj sopirantaj junuloj.

Komprenoble tio ne estas vera tie, kie ekzistas junulara grupo.

Sed jen pro tiuj supre cititaj kaŭzoj ne ekzistas multaj junularaj unuiĝoj.

Ekzistas tamen kelkaj. Malfeliĉe pro tio la problemo ne estos solvita. Tiaj junaj grupoj devas havi altirpovon kaj varbokapablecon. Ĉu ili havas tion? Ĝenerale ne. Permesu ke mi nur pro komparo rakontu iom pri la studenta flandrema movado. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi rapidege progresis. Kion la gvidantoj faris? La junajn stu-

dentojn de 14, 15, 16 jaroj, do, kiam ili malfermiĝas aŭ por idealistaj koncepto kaj vivkonduco aŭ por tre materiala kaj propra vivo, tiujn studentojn ili allogis al klubojn. Tie estis diversaj ludoj. Ili organizis vojaĝetojn kaj konkursojn. Kelkfoje estis paroladvespero dum kiu la talento de la parolanto korprenis la aŭdantaron. Je la fino oni kantis la « Flandran Leonon ». Por fini la somerajn libertempojn, post multaj plej malsimilaj plezuraĵoj, okazis la jara festo, dum kiu venis paroladisto, konata kaj ŝatata gvidanto de la movado, kaj dum kio oni je lasta fojo fiksas la farendajn kaj farotajn programpunktojn por la sekvonta lernojaro. Jaroj pasis. Knaboj iĝis junuloj; estas en la plej altaj klasoj; devas nun mem gvidi kaj estri la marŝon de la klubo. Nun venas pli da laboro, malpli da plezuro. Sed ili jam konkiris sufiĉe da konvinko kaj da arda volo por elteni plej kuraĝe. Feliĉega tempo. Malrapide ili transiris el la ideala idealismo al la ideala realismo. Sed ankoraŭ dum tiu unua facila periodo ili akiris la necesan konvinkon kaj volon. Ili staras nun fortaj kontraŭ malsakcesoj kaj kontraŭ tentoj diversspecaj. Kiel en ĉiuj aferoj estas ankaŭ ĉi-tie la ekentuziasmo vojo, kiu estas la plej bela. Oni nur bezonas zorgi ke dum tiu tempo oni amasiĝu sufiĉe da idealismo por ke pli malfrue oni povu persisti.

Cu laŭ sama vojo progresos la junulaj grupoj en la Esperanta movado? Ne kaj preskaŭ neeviteble ne. Ĉe ni oni ne povas komenci per romantiko, malfeliĉe. Ni devas komenci per teda trimestro de 16 lecionoj; almenaŭ se ni ne volas meriti la insulton ke nia grupo ĉion konas escepte Esperanton. Ĉe ni oni transiros el la realismo al la idealismo. Vi eble diras : kaj la junuloj de ĉirkaŭ 20 jaroj. Ili ne plu bezonas tiom da romantiko. Vere. Sed ! Ju pli oni estas aĝa desmalpli oni trovas liberan tempon por okupiĝi pri novaĵoj.

(*Finota.*)

## Bibliografio

(Duope ricevatajn verkojn ni recenzas, unuope ricevatajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

*Freude durch Esperanto !*

Lernolibro German-Esperanto de registara konsilisto Hugo Steiner, prezidanto de Austria E. Asocio kaj fondinto de la Intern. Esp. Muzeo en Wien. S. 2.— plus 32 gr. afranko, havebla ĉe la eldonejo « Das Kleine Volksblatt » Wien VII, Bandgasse.

La lernolibro estas klare presita, ampleksas 96 paĝojn kaj enhavas kurson en 16 lecionoj. Plie klarigojn pri la interna organizo de U. E. A. kaj aliaj oficialaj institutoj de la Esperantistaro. Ĝi certe trovas sian vojon inter la german-parolantoj.

*Esperanto-Hispan-Amerika vortareto* de Jesús Amaja, Asp. 59 Meksiko D. F. Prezo : 2,5 respond-kuponoj.

*Komiza Esp. Gazeto.* Eldonejo: Fako 34 Gunnarstorp Svedujo. Prezo : 1 respondkuponon. Ĝi aperas ĉiutrimonate, estas maŝinskribita sur palblua papero. La gebutikistoj trovas en ĝi multvalorajn konsilojn.

Flandra Esperanto-Instituto eldonis malgrandajn kalendaretojn kun reklamteksto. Niaj legantoj povas peti senpagan alsendon de tiuj kalendaretoj al F. E. I.

## **Florekspozicio en Heemstede apud Harlemo**

---

La duna regiono de la nederlandaj provincoj Nord- kaj Sudholando estas mondkonataj pro siaj multkoloraj bulbokampoj dum la printempo. Miloj da eksterlandanoj ĉiujare vizitas la ĉirkauaĵojn de Harlemo, por ĝui la freŝajn helajn kolorojn de multspecaj bulbokreskaĵoj.

Dum la supre menciita periodo okazos grandioza florekspozicio, kiu okupos 25-hektaran terenon kun aleoj, herbejoj kaj lagetoj. Pli ol 5.000.000 da florbuloj, pli ol 100.000 plantoj, arboj kaj arbustoj en la venonta printempo florados honore al la floramanta publiko el ĉiuj mondpartoj.

La organiza komitato de la ekspozicio eldonis simplan, sed klaran kaj bonlingvan sespaĝan *faldfolion esperantan* por inviti ankaŭ la esperantistan publikon al plej bela kaj riĉa florifesto en Nederlando.

Gesamideanoj, petu *senpagan alsendon* al s-ro E. de Wolf, ĝenerala sekretario de la Nederlanda Asocio Esperantista « L.E.E.N. », Joh. de Breuksrr. 18, Harlemo, Nederlando.

Vizito al la ekspozicio povos koincidi kun *partopreno en la Via Nederlanda Esperanto-Kongreso*, organizota de « L.E.E.N. », je la 30a de Marto en Harlemo. Ankaŭ tie eksterlandaj gesamideanoj estos kore bonvenaj. Por informoj oni sin turnu al la sama adreso.

Aliajn gazetojn ni afable petas, represi ĉi tiun artikoleon kaj sendi ekzempleron al : Direkcio « Flora », Heemstede (Nederlando).

## **Per-Esperanto Muzeo**

---

En Veliko-Tirnovu, la malnova bulgara ĉefurbo kaj urbolulilo de Esperantismo en Bulgarujo, estas fondita « Universala Per-Esperanto Muzeo », sub la protektado de la Urbestro. En tiu-ĉi urbo ĉiam ekzistadis vigla esperantista vivo kaj la lingvo internacia estas tre multe parolata.

Nun la gesamideanoj en la tuta mondo estas petataj helpi en la kolektado de muzeaj objektoj. Rekompence ĉiu sendanto de objektoj (eĉ de malgrandaĵo) ricevos dankleteron-vidaĵon de la urbo. Por pli valoraj sendaĵoj oni donacas esperantajn librojn, bildojn, pentraĵojn aŭ aliajn aĵojn de bulgara popolarto. La « Per-Esperanto Muzeo » deziras korespondi kun fakuloj de muzea scienco kaj interŝangi objektojn kun aliaj muzeoj.

Adreso : Muzeja, Obŝtinata, Veliko-Tirnovu (Bulgarujo).





# Mi jam pagis mian kongreskotizon ; Ĉu ankaŭ vi ?

---

---

## Inter Ni

*ANTWERPEN.* — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Dum la antaŭaj monatoj niaj membroj montris ke ili restas ĉiam tre laboremaj. La 23an de januaro nia fervora prezidanto malfermis la serion de paroladoj kun la utila kaj aktuala subjekto « La evolucio kaj la funkciado de la telefonaparato ». Nia prezidanto pruvis ke li estas bona parolanto kaj tute kompetenta por sia tasko. Sekve al tiu-ĉi parolado ni vizitis la 30an de januaro la Antverpenan telefoncentraton sub kapabla gvido. Tiu-ĉi vizito estis tre interesa kaj lerniga, sed ankaŭ sufiĉe malfacila por kompreni por laiko. Post la lerniga parolo de nia Jef, ni havis la 7an de februaro humoran prelegon, de nia kasisto, el la libro « Bonhumoro » de P. Nijssens. La tutan vesperon regnis humora atmosfero kaj post la prelego ankoraŭ multaj rakontoj sekvis unu la alian.

La 14an de febr. nia amiko Rik Van Durme, vicprezidanto de la grupo, parolis pri la libro « Martha » de Orzeszko, pola rakonto tradukita de Dro Zamenhof; post la prelego nia Rik atendis interesan diskutadon, sed ĉar la virina elemento ne estis reprezentita, la heroino Martha ne trovis multajn defendantojn.

La 21an de februaro S.ro Boeijens daŭrigis la serion de prelegoj per prelego el la monata revuo « Literatura Mondo ». Estas do pruvo ke la anoj tre ŝatas la novan labormanieron de la grupo kaj bonvolas kunlabori, por ke la grupo restu unu el la plej aktivaj de la novado.

Ĉar la programo por la venonta monato ne jam estas fiksita, ni petas niajn geamikojn bonvoli konsulti la Antverpenajn gazetojn, la paroladoj kaj vizitoj estos ĉiun semajnon anoncataj.

La 9an de marto nia grupo organizos en la salono « De Ton » Pelikaanstr., maskitan kaj nemaskitan balon Ĉiuj geamikoj de « Flandrema Grupo » estas bonvenaj.

*BRUGGE.* — KATOLIKA JUNULARA ESP. GRUPO.

Ĉar la kurso finiĝis, ni nun dediĉas parton de ĉiu kunveno al perfektigo. Portretoj kaj romanoj estas tre interesa materialo por lingvo-ekcerzado.

La 20an de januaro ni organizis efektplanan progapandon. 500 flugfolioj « Katholieken leert Esperanto » ni disdonis al K.J.O. anoj, mezklasanoj, studentoj kaj skoltoj.

Estas precipe inter ili ke oni devas propagandi : Ĉar la junuloj de hodiaŭ estas la viroj de morgaŭ.

La junularo estas la estonteco.

**BRUSSEL.** — N.E.L.E. — La 12an de februaro nia animo E. Sindhwad organizis por nia grupo kant-kaj amuzvesperon. Tiu vespero tre plaĉis al la anaro. Belaj premietoj, donacitaj de la organizantino, plivigligis la ludojn. Nia ano R. Loeckx aŭdigis belan violonludon.

**KORTRIJK.** — Dimanĉon, la 27an de januaro okazis la jara festo de la grupo. Oni povas konsideri ĝin kvazaŭ regiona kongreso, ĉar ĉeestis 150 gesamideanoj de diversaj grupoj kaj el Norda Francujo.

S.ro De Kegel el Aalst faris demonstracion de Cseh-kurso, kio estis vera novaĵo por la aŭskultantoj, kiuj jam multon aŭdis pri tia kurso sed neniam kontaktis je ĝi.

La bona reputacio de la Kortrejkaj festoj estas verŝajne akirita pro la danemuziko, ĉar ĉiuj eksterurbaj festantoj devis kuregi, por kapti la lastan vagonaron...

Dum la ĝenerala kunveno okazinta la 6an de februaro, estis elektita la estraro por la jaro 1935. Ĝi konsistis el S.oj Debrouwere, Steeland, Ant. Cognie, Vanfleteren, Bossuyt, Casier, Doornaert, F.ino N. Lecossois, S.oj André Vandenberghe kaj Maelfait.

La sekretario de la grupo nun estas S.ano Antoine Cognie, Moeskroenstraat, 11.

Merkredo, la 6an de marto, ĝenerala kunveno en la kutima ejo, je la 8-a vespere.

#### **RONSE.** — LA PACA STELO.

6an de marto : Kantvespero — Duvoĉa allernado de la kantoj : La floroj del'ĝardeno (germana kanto); Hejmo, dolĉa nom' (angla kanto); Ofte en paca nokt' (irlanda kanto).

13an de marto. — Traduko de la libro « La Filosofo de Haagem ».

20an de marto. — Daŭrigo de la perfektiga leciono pri la « Akuzativa formo » de S.ro Broodcoorens.

La grupo ankaŭ organizis ŝparkason por partopreni multnombre al la Flandra kongreso en Bruselo. Ni liveros belan kontingenton tre verŝajne pli grandan ol pasintan jaron.

#### **RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO.**

Dimanĉon la 10an de februaro okazis la ĉiujara grupfesto. Multnombraj estis la ĉeestantoj, ĉar krom la Ruselaraĵ gemembroj ankoraŭ ĉeestis la najbaraj grupoj el Kortrijk kaj Lichtervelde.

S.ro De Waele el Duinkerke, internaciigis la kunvenon per sia tre ŝatata ĉeesto.

Dum la festo nia fervora membro Paŭlo Samijn kantis longan memfaritan kanton pri la diversaj okazintaĵoj en la R.E.G. dum la pasinta jaro. Eĉ la gefratoj Callewaert, gelernantoj de la tutlasta kurso, kantis du, de ili esperantigitajn kantojn; ambaŭ kun granda sukceso.

Ĉar la kutima gvidanto bonsoldatmaniere ne multe laboris, alia membro devis gvidi bone malbone la feston. Tamen ĉiuj estis ĝojplenaj kaj bone amuzis.

---

---

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.  
**Ondervoorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.  
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.  
**Penningmeester:** Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.  
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.  
**Postcheck:** Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.  
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.  
**Lidmaatschap** (met maandblad): 20 fr. per jaar.

### **Aangesloten groepen:**

**Aalst:** « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.  
**Aarschot:** « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.  
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 10, vergaderingen elken Woensdag avond.  
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.  
**Brugge:** « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.  
**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.  
**Edegem:** « Nia Idealo », Hovestraat, 130.  
**Hamme:** « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.  
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.  
**Lede:** « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.  
**Leuven:** « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.  
**Lichtervelde:** Sekretariaat, Weststraat, 47.  
**Mechelen:** « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wollemarkt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.  
**Nieuwpoort:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.  
**Oostende:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.  
**Oudenaarde:** « Al Paco »; sekretariaat: Wijngaardstraat, 17.  
**Roeselare:** « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.  
**St. Niklaas:** « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

### **Alle inlichtingen verstrekken verder te:**

**Diksmuide:** M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.  
**Gent:** Juliette Terriijn, Raapstraat, 82.  
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stacegemstraat.  
**Hoboken:** J. de Groot Caronstraat, 31.  
**Maria-Hoorebeke:** Gerard Broodcoorens, Dorp.  
**Meenen:** K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.  
**Millen (Tongeren):** L. Geukens, Langstraat.  
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.  
**Ronse:** « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.  
**Thielt:** R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

---

---

OSTENDO

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

### KANTARO ESPERANTISTA

Kompilata de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,  
estas 112 paĝa,  
enhavas ion por ĉies gusto,  
enhavas la plej belajn verkojn el la  
popolkantoj de ĉiuj nacioj,  
estas bele eldonita,  
kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe

H. v. d. Mast.

Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

« BREUGHEL »

SPÍJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brusel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj  
malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

**Kien iri je Pentekosto 1935?** (8 - 10 Junio  
Al la  
**6<sup>A</sup> Flandra Kongreso de Esperanto en Brussel**

## **300 Bildojn Kaj 1100 Titolvortojn**

en densega komposto prezentas al vi la

UNUA VOLUMO DE

## **ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO**

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj, formato 15×23. La dua volumo ampleksos  
proks. 540 paĝojn.

(Eldono de Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistoj Libro-Amikoj  
Budapest). .....

Ĝi pritraktas per metodoj de scienca laboro la tutan movadon ekde la  
naskiĝo ĝis la plej lastaj tempoj. Detala historio. Proks. 2000 biografioj. Indiko  
de libroj, ktp.

Prezo de la du volumoj (la unua sendota tuj post pago): broŝurite 30 fr.  
svis., bindite: 34 fr. sviz. Aldonu 10 % por sendkostoj.

Ekzistas ankaŭ eldono sen ilustraĵoj. Prezo de ambaŭ volumoj, nur bro-  
ŝurite: 18 fr. sviz. plus 10 % por sendkostoj.

**Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan.**

Havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto. (Poŝtkonto n° 326.851)

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.